TEATR DRAMATYCZNY
im. Al. WĘGIERKI

ANTOINE DE SAINT-EXUPÉRY

MAŁY KSIĄŻĘ



SOLECO DE LA HOMO AŬ SIMPLE ANTOINE DE SAINT-EXUPÉRY

„Mankis al li tiuj miloj da nodoj, kiuj ligas lin kun la aliaj kaj aldonas pezon."

„Conrad de la aero" – kiel ofte estas nomata Saint-Exupéry – ne estis kavaliro sen timo kaj makulo. Li havis en si nenion el asketo. Li estis nek modera nek abstina. Okazis, ke li estis maldiligenta, frandema, voluptema... „Li kunligis en si tre veran kaj tre profundan mistikismon kun granda amo al ĉiuj korpaj voluptoj kaj kun tuta manko de respondeco en la ĉiutaga vivo...". Li estis do la homo korpe kaj anime, persono tre bunta kaj originala, kun siaj malvirtoj kaj inklinoj. Tamen samtempe li sukcesis resti ĉiam fidela en esencaj aferoj al tiuj idealoj, kiuj inspiris lian verkadon. „Lia verkado – skribas Z. Bieńkowski – estas en opozicio al preskaŭ ĉiuj fluoj kaj individuoj de la epoko. Dum la nuntempa monda literaturo penetras fundon de la infero, serĉante la malsupran limon de la homa sperta, kaj atingas la grandecon torturante la humanecon, la verkado de Saint-Exupéry estas esplorado de la humanisma ĉielo, provo atingi la plej supran limon de tio, kion esprimas la malnova, ĉiam morale aktuala vorto – „h o m o". Pro tio ŝajnas al mi, ke la tutan lian vivofilozofion oni povas nomi la traktato kontraŭ la fremdiĝo, kontraŭ soleco de la homo en la nuntempa mondo".

En ĉiuj libroj de Saint-Exupéry ni povas trovi esprimojn de sopiro al la infanaĝo kaj familia hejmo. Kiam komencas kreski seniluziiĝo kaj amareco pro la vivo, kiu portas pli kaj pli malmulte da kontentigo kaj pli multe da ĉiutagaj zorgoj, tiam la menciita sopiro plifortiĝas. Ĝia esprimo fariĝas skribita en 1942 en Nov-Jorko „La Eta Princo", kiu apartenas al la plej popularaj en la verkaro de la aŭtoro, fascinante same plenkreskulojn kiel infanojn. Post la tralego de „La Eta Princo" ĉiu sentas sin „elektita" kaj „alvokita", en ĉiu vekiĝas sopiro al la Arkadio de la koro, en kiu la homa vivo dependas de la am – kaj amikec – leĝoj. Ciuj, same kiel la alvenanta sur la Teron la Eta Princo, provas trovi amikojn. Tamenkiel ĝuste rimarkis la vulpo – „LA HOMOJ NE HAVAS PLU TEMPON POR ION KONI, ILI AĈETAS ANTAUE PRETAJN OBJEKTOJN ĈE VENDISTOJ. SED, CAR AMIKO-VENDISTOJ NE EKZISTAS, LA HOMOJ NE HAVAS PLU AMIKOJN. SE CI VOLAS AMIKON, CI MALSOVAĜIGOS MIN!"

Do, de la vulpo ekscias la Eta Princo pri la amikeco. Kaj la amikeco estas precipe forta formo de la interhomaj nodoj kaj la amiko estas kiel montpinto, kie eblas profunde respiri". Du estaĵoj kunligitaj per la amikecnodo ne estas por si „spegulo" sed „fenestro". Kaj ilia amikeco, dum la tuta vivo provigata, transformas, helpas „estiĝi", fariĝas netaksebla valoro.

Saint-Exupéry diris en „La Eta Princo" pri la homoj – pri iliaj amo, amikeco, morto – la plej simplajn verojn. Tiujn, kiujn oni atendis. Ĉiu povas trovi inter ili la solan, veran, sian, kiu permesos al ĝi ne senti sin „pli soleca ol ŝiprompiĝulo sur la floso meze de oceano".

JOLANTA BIELIŃSKA

OW
Dział ... ZG ZASP

DRAMTEATRO JE LA NOMO DE A. WĘGIERKO
EN BJALISTOKO

ĈEF – KAJ ART-DIREKTORO
ANDRZEJ JAKIMIEC

Malgranda sceno **Sezono 1988/89**

ANTOINE DE SAINT-EXUPÉRY

LA ETA PRINCO

LE PETIT PRINCE

Traduko: PIERRE DELAIRE

ADAPTO KAJ PLENUMO:
BARBARA ŁUKASZEWSKA

Reĝisora helpo: **Andrzej Jakimiec**

Programa konsultado:
Jolanta Bielińska

Grafika prilaboro: **Ewa Szydłowska**

Traduko de la programo: **Grażyna Barszczewska**

Administrejo:
Bjalistoko, str. Elektryczna 12

KAJ SE IU NE KOMPRENIS – TIO SIGNIFAS, KE ĜI ESTAS PLENKRESKULO, KIU ŜATAS CIFEROJN

Laborante nur por akiri materiajn havaĵojn, ni konstruas por ni malliberejon. Ni fermiĝas solecaj kun la traŝutiĝanta inter la fingroj oro, kiu ne donas al ni ion, por kio valorus vivi.

✡

Nur per la koro ni bone vidas. Kio estas la esenco, estas nevidebla per la okuloj.

✡

Mi ne malkaŝos al vi la kaŭzojn, por kiuj vi min amas. Ili ne ekzistas. La kaŭzo de amo estas la amo.

✡

Ami ne signifas: kontempli sin reciproke, sed: ambaŭ rigardi samdirkten.

✡

La vera amo elĉerpiĝas neniam. Ju pli multe vi donas, des pli multe da ĝi restas por vi.

✡

La amo ne estas trezoro, kiun oni ekposedis, sed ambaŭflanka sindeviĝo.

Adorado preparas la vojon por la amo, sed envio preparas la vojon por la malestimo.

✡

Kiu en la amo antaŭ ĉion metas la amheroldon, tiu neniam ekkonos la amplenumiĝon.

✡

Spite al la ĝenerala opinio, la amo ne donas suferon. La suferon donas posedinstinkto, kiu estas malo de la amo.

✡

Infanaĝo – tiu granda tero, de kiu ĉiu el ni eliris.

✡

Ni konsentas kun tio, ke ni ne estas eternaj, sed ni ne povas elteni tion, ke niaj aferoj kaj agoj perdu subite en niaj okuloj ĉiun sencon. Ja tiam nudiĝas malpleno, kiu nin ĉirkaŭas.

✡

Tiu manio prijuĝi la homon laŭ nur unu eco.

✡

Kiu malaltigas, mem estas malalta.

✡

Kolero ne blindigas: ĝi naskiĝas el la blindiĝo.

Por transformi la homon en ĝi mem, oni ne devas malpligrandigi ĝin, sed permesi al ĝi esprimi sian opinion, doni celon al giaj sopiroj kaj kampon por ĝia agado. Transformi – ĉiam signifas liberigi.

✡

Cu ne estus pli bone, anstataŭ neniigadi malbonon, disvastigadi bonon?

✡

Cu vi memoras, ke la feliĉkondiĉo estas neniam serĉado de la feliĉo?

✡

La homo estas des pli granda, ju pli fidele ĝi staras ĉe siaj principoj.

✡

La amikecon mi rekonas laŭ tio, ke nenio povas ĝin trompi kaj la veran amon laŭ tio, ke nenio povas ĝin neniigi.

✡

Apenaŭ homo maturiĝos, oni lasas ĝin al si mem.

SSP „Podlaska" zlec. 707/88 N. 500 A-5, E-6